
# Aŭstraliaj  Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby**

**PLENUMITA 18/08/2022 Kvincentnaŭdeksesa eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;


**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro*
*lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *esperanta retradio* *Plena Analiza Gramatiko*


*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 692,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **298,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **158,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **141,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018
Nun studas **95,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )



## la esperanta retradio



Donas bonan ĉirkau-5 minutan aŭskultadon kaj legadon ĉiun tagon. **Pli simpla laringo ebligis paroladon**

8a aŭgusto 2022

Karaj Amikoj NOTU! Numero 600 de AE post kelkaj semajnoj kaj eble 601 precize 11 jarojn post unua de 2011, eble unu semajnon pli poste! Kion povus eksteraŭstraliaj gelegantoj, kiel mi, kontribui? s-ro Ueli HAENNI

# Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn.

Kiam oni informas min pri fuŝaj vortoj, frazoj, ktp. kiun mi ricevas dum la unua semajno post la ĝenerala elsendo, ili estas korektitaj antaŭ ol mi sendas kopion al AEA por la arkivoj

http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo *Roger Springer*

# Aŭskultu nian AEA Prezidanton en ABC Radio Intervjuo

Post avizo de Sandor Horvath koncerne intervjuon sur "*Nightlife" ABC radio*, mi aŭskultis ĝis duono post la deka p.t.m. lastan vendredon, sed aŭdeblis nur tedaj kvizodemandoj fare de James O'Loghlin kaj sekvaj respondoj de ABC aŭskultantoj. Malbonhumore mi enlitiĝis.

Sed! La postan tagon mi guglis kaj trovis la intervjuon, *Who created the language Esperanto.....?* La 23-minuta podkasto estis tre interesa, kaj mi gratulas al Sandor pro liaj respondoj. Cetere, James O'Loghlin estis tre simpatia, do aldona pluso. (Parenteze, verŝajne la programero estis disaŭdigita je la oka a.t.m., ne la deka p.t.m., do nesurprize, ke mi maltrafis ĝin. :) Mi rekomendas al AE legantoj la **podkaston.** *Vera Payne*



Hieraŭ,12a aŭgusto 2022, Sandor Horvath estis intervjuita pri Esperanto ĉe ABC radio dum 20 minutoj.https://www.abc.net.au/radio/programs/nightlife/saluton-who-created-the-language-esperanto-and-why-dont-more-of-/14018212 Amike, *Nicole Else*



# Kleraj gepatroj havas pli grandajn familiojn



Mi legis en AE-594 titolon de artikoleto en "La Esperanto Retradio", *Kleraj gepatroj havas pli grandajn familiojn*, kaj mi horortremis. Ĉu ne jam troas homoj sur ĉi tiu kompatinda planedo nia? Antaŭ kelkaj jardekoj estis parlamentano en Tasmanio kiu estis patro de 11 infanoj, kaj la Ĉefministro de NSK jam patris ses. Foje, antaŭ ol haveblis koncipoprevento, mankis elekto. Sed nun? Ĉu vere estas klere, aŭ simple egoisme generi multoble? *Vera Payne*








Mt Gravatt, Brisbane Mount Gravatt estas malgranda monteto, alta 195m, ĉirkaŭ 8 kilometrojn sudoriente de la centro de Brisbane. Ĝi restas relative natura komparite kun la ĉirkaŭaj urbpartoj kovritaj per domoj kaj aliaj konstruaĵoj. Sur la monto ekzistas multaj piedvojoj per kiuj oni povas atingi la pinton de la monto kie trovas sin parketo kaj restoracio. De la supraĵo oni havas vidaĵojn okcidenten al Morton Bay kaj la tieaj insuloj el sablo (ĉirkaŭ 50 km), norden super la nubskrapilojn de la urbocentro ĝis la Glasshouse montoj (ĉirkaŭ 80 km), kaj okcidenten ĝis al montaro de la Darling Downs inklusive Cunninghams Gap (ĉirkaŭ 180 km), la pordo al regiono ĉirkaŭ Warwick ktp. Plue, multaj specoj de birdoj kaj eĉ koaloj loĝas tie. Kiel vi povas imagi, je la fino de semajno multe da personoj (kun hundo!) supren iras por fari belan vagadon tra la arbustaro kaj inter la piedirantoj dimanĉe mia edzino kaj mi ofte iras supren por matenmanĝi,





kaj ĝui la vidaĵojn. Nun ke la printempo venas, la arbustoj kaj aliaj plantoj ekfloras. Post pluvo, oni ankaŭ trovas interesajn fungojn inter la folioj kaj sur ŝtipoj sur la tero. Ĝi estsa tre havinda loko por la loĝantoj ti





*Doug Eising*

# Plie pri Belmetio kaj Arto. *Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



## PENO POR KLARIGI MIAJN "ERAROJN".

Mi dankas Jonathan pro montri miajn "erarojn".
Jen miaj tialoj por ili.
1). Mi uzas la vorton "belmetio" anstataŭ "metio", ĉar temas pri agoj lasi la manojn trovi la plej belajn formojn de iu metiaĵo ("craft"), kontraŭe al kio okazas en arto. Do "metio" ne sufiĉus.
2). Mi trovas facila distingi inter arto kaj belmetio.
3). Mi ne sufiĉe klare menciis, ke Arthur Boyd ne apartenis al la Heidelberg Skolo.
4). La adverbo aŭ adjektivo koncernas la "regulon" de Zamenhof, ke kiam la antecedento estas Infinitivo aŭ frazo, la Propozitivo devas esti adverbo, ne adjektivo kiel en la angla.

Ĉi tiu regulo de Zamenhof baziĝas sur gramatika miskompreno de Zamenhof kaj estas tute kontraŭa al la gramatiko de Esperanto (kaj de la angla lingvo). Li malĝuste pensas, ke en tiaj kazoj la infinitivo estas verbo kaj ke la frazo estas verbo.
. Ni prenu kiel ekzemplojn la jenajn frazojn.

1). Manĝi estas utile/a.
2). Manĝi en la frua mateno estas tre utile/a.
3). Ke ni manĝu estas utile/a.
4). Ke ni manĝu en la frua mateno estas ege utile/a.

Notu ke Infinitivo povas esti verbo aŭ substantivo, kaj notu ankaŭ ke la frazo estas "ke ni manĝu", NE "Ni manĝu"! "Ke ni manĝu" certe ne estas verbo, sed havas la valoron de substantivo, kiel en "Mi akceptas ke ni manĝu" = "Mi akceptas tion, aŭ tiun proponon" en kiu frazo ĝi estas substantiva Rekta Objekto. Objekto kaj Subjekto kutime estas Substantivo. Same Infinitivo estas preskaŭ ĉiam Substantiva, kiel "Atendi" = la atendado daŭros ĝis postmorgaŭ, kaj estas malagrablA. Konsekvence la Propozitivo devas kutime esti Adjektivo aŭ Substantivo. Mia frazo do devas esti "Legi miajn nunajn juĝojn (= La legado de miaj nunaj juĝoj) pri la Arto en Aŭstralio, (eble) estas utilA aŭ interesA". (Notu ke la akuzativo en "miajn k.t.p." ne estas la kerno de la Subjekto, kiu kerno estas "Legi", kaj do "utila " referencas gramatike nur al la substantiveca "legi", ne al "miajn" k.t.p.).

Ĉar uzi Adverbon estas malĝusta en tiaj kazoj, kelkfoje okazas, ke se oni uzas ĝin, la rezulto povas havi du tute kontraŭajn signifojn (ekz. "La knabo juĝis la agon de la instruistino malĝuste = esti malĝustA aŭ La knabo juĝis en malĝusta maniero la agon de la instruistino = kiu ne malĝustis malĝustE - = la knabo estas maljust-aga"). Kiam oni indikis tion al Zamenhof, lia konsilo (en "Lingvaj Respondoj") estis uzi adjektivon anstataŭ adverbon (kiun bezonas la alia signifo. Do en multaj jaroj Esperanto havis la tute kontraŭecon de la Esperantaj logiko kaj senescepteco. Kelkaj Esperantologoj kaj mi kaj Kalocsay rimarkis tion kaj decidis, ke Esperanto ne posedas verban Pasivan voĉon. Kaj oni ĝuste malakceptis la multajn "inventojn". Ĝis post la morto de Kalocsay mi eltrovis akcepteblan formon por tiu Verba Pasiva Voĉo, pro aligramatikaj diraĵoj de Zamenhof mem.

Tiu akcepteblo baziĝas precipe sur la fakto ke Zamenhof aligramatike uzas la neformulitan sed uzatan regulon pri signifolimigo. Tiel la regulo estas, ke NUR VERBE UZATA SUFIKSO KAJ NUR LA SUFIKSO "AT-" INDIKAS LA PASIVAN VOĈON EN ESPERANTO, PER UNU VORTO. Ekz. "La hundo batatis de la kruela viro". *Marcel Leereveld.*




# Malbona surprizo

Mi nun atingis la urbeton, kie mi pasigis miajn unuajn jarojn sur la tero, apud mia avino: Cesson Sevigne , tiam vilaĝo apud la ĉefurbo de Bretonujo, Rennes. Promenante laŭ la rivero, Vilaine ( tio signifas" malbela" , legendo por alia tago) , mi ne povis kredi ke nun kovras ĝin plantoj, kiuj ne plu permesas boati. Tio estis la allogaĵo al la vilaĝo por la Rennes-anoj, kiuj volis spiri freŝan aeron dum la semajnfino. Laŭ specialisto pri akvaj medioj, tiuj plantoj de sudameriko jam komencis invadi la riveron en 1920-1930. La akvario-posedantoj verŝis la akvon de la akvario en la riveron. La fiŝoj ŝatas ilin . Sed pro la nekutima varmego, la nivelo de la akvo malaltiĝis kaj la plantoj tiom kreskis ke la kajakoklubo,kie la ĉampionoj kutimis trejniĝi ne plu povas tion fari. Ankaŭ naĝi estas danĝera pro la longeco de la tigoj de la plantoj. Ili longiĝas je 2 aŭ 3 metroj .



Entrepreno regule fortranĉas la tigojn , sed tio ne solvas la probemon , des pli ke akvo de akvarioj daŭre eniras la riveron *Franciska Toubale*

# Nova filmo kiu mencias Esperanton

"The duke" estas nova brita filmo en kiu viro ŝtelas faman pentraĵon. Li poste ĉantaĝas, ke li redonos la pentraĵon se li ricevas altan sumon por doni al malriĉaj maljunuloj. Ŝajne tre bona filmo kaj ... ĝi mencias Esperanton kaj Zamenhof. Jen la teksto "*One who hopes. Translated from what, I couldn't say. Esperanto, presumably. ,,,,*

*In fact, he was a Polish eye doctor. L. L. Zamenhof. His dream was to bring humanity together by means of a universal common language."* (Iu kiu esperas. Mi ne scias el kiu lingvo ĝi estas tradukita. Supozeble Esperanto.... Fakte li estis pola okulkuracisto, L. L. Zamenhof. Lia revo estis kunigi la homaron per universala komuna lingvo) Amike, *Nicole Else*

